


# LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO  
POR LA

JUNULARO KAJ  
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:  
West-Graafthijk (N.H.)  
Nederlando.  
Ĝironumero 209354 Nederlando.  
Tel. 10

Jarabono:  
Nederlando: 0.75 guldeno  
Aliaj landoj: 1 guldeno  
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj.

## KIU SCIAS.

La pluvo surprizis min dum iu promenekurso tra Francio. Mi serĉis rifuĝon en malgranda gastejo kaj tie mi renkontis lin. Li estis afabla viro. Ni ekbabilis kaj li invitis min kuniri — li estis fraŭlo kaj vivis pensione — kaj se la terura vetero ne pliboniĝus, mi povis tranokti ĉe li. Tio efektive okazis. Ni vespermanĝis kune kaj kiam poste ni sidis ĉe bone krakanta fajro, mi ekhavis senton, kvazaŭ jam dum jaroj mi konis ĉi tiun afablan, modestan viron. Eble li same sentis, ĉar tiun vesperon li rakontis al mi ion el sia vivo. Li diris subite, rigardante la fumon de sia pipo, — ni ĵus parolis pri krimoj — laŭ la tono de iu, kiu subite devas eligi ion longe prisilentitan: „Foje mi mortigis homon.”

Vidante mian konsterniĝon, li rakontis al mi la historion.

„Neniu, kiu mem ne spertis ĝin, povas scii, kion signifas tio: travivi militon.....”

„Ĉu vi do partoprenis la militon?”

„Soldato mi ne estis, por tio tro juna. Sed en lando, kiu militas, ĉiu partoprenas la militon, ankaŭ kiam oni restas hejme. Ĉiu sentas la fatalan influon, ĉiu konservas el ĝi — konscie aŭ nekonscie — cikatron. Mi memoris tiun okazaĵon dum mia tuta vivo kaj mi kredas, ke ĝi multon malbonigis al mi. Mi estis sentema infano, kiu eĉ al muŝo ne malbonfarus. Mi estis dekdujara, kiam la milito eksplodis. Vi taksis min verŝajne multe pli aĝa, tion faras ĉiu. Mi estas el urbeto en Nord-Francio. Miaj du pli aĝaj fratoj mortis en la batalo, mia patrino estis apatia pro ĉagreno, mia patro farigis en kelkaj semajnoj maljunulo. Tiam la Prusoj venis en nian



urbeton. Mi lernis malami ilin kaj fakte mi atendis vidi bandon da monstroj, diabloj kun rikanantaj vizaĝoj. Mi estis mirigita, preskaŭ elrevigita, ke ili estas homoj, kiaj ni, kiuj foje ridis al mi kaj afable alparolis min en kripla franca lingvo. Timeme mi retiris min kaj nenion plu komprenis. Se ili ne estis malbonaj, kial do ili mortigis miajn fratojn kaj multajn aliajn? Mi iom respiris, vidante iun tagon kapitanon, kiu estis pli konforma al mia ideo pri la germanoj. Eble tiu viro estis dum paca tempo ne tia malbona homo, sed la milito malkovris en li ĉian kruelecon en homo kaŝitan.

Li pafmortigis pro bagatelo la patron kaj fraton de mia amiketo. Tio terure trafis min. Mi decidis venĝi ilin. La kapitano tranoktis en domo, kiun mi bone konis, ĉar antaŭe loĝis en ĝi iu kamaradeto de mi. Kaj kiam mi nerimarkite lin volis viziti, mi grimpis laŭ akvotubo supren al balkono kaj poste tra fenestreto mi engrimpis. Infanoj ŝatas tiajn misteraĵojn.

Mi sciis, kie kuŝis la ŝargita revolvero de mia patro. Iun nokton mi ellitiĝis kaj forprenis la armilon. Ofte mi ĉasis kun la patro kaj mi povis uzi fusilon aŭ revolveron. Mi engrimpis la domon — la fenestreto estis ankoraŭ kia antaŭe — mi ŝteliris en la ĉambron de la kapitano, kaj pafmortigis lin en la dormo.”

Li pale ridetis, vidante mian konsterniĝon.

„Jes, tio sonas sufiĉe krude kaj strange, sed en tiuj tagoj multaj aferoj estis krudaj kaj strangaj. Mi ne povas fari tiom da sensacio pri la afero ol kiom mi farus, se la sama ago nun okazus. Kaj estas tio, kio min poste pleje turmentis. Mi savis min, ĉar mi estis lerta kiel simio kaj neniu suspektis min..... infano, time-ma kaj trankvila infano! La trupoj devis foriri la sekvan tagon, do restis nur malmulta tempo por esploro kaj revenĝo.

Iam mi rakontis ĉi tiun historion al knabino, kiun mi amis. Poste ŝi sentis ĉiam abomenon al mi. Tial mi neniam edziĝis. Ŝi ja ne konis la militon kaj ne sciis, ke ĝi venenas la aeron, kiun oni enspiras, kaj eĉ pli la pensojn kaj sentojn. Duafoje mi parolis pri tio al amiko. Li ridis kaj pensis, ke mi fanfaronas. Miaj gepatroj neniam eksciis tion. La patrino estis litmalsana, la patro nur post longa tempo rimarkis, ke la revolvero estas for. Mi ĵetis ĝin en la riveron. Kion ajn li pensis, certe ne, ke lia silentema filo povus fari tian agon. Eble li estus fiera pri mi! Sed mi mem ..... mi daŭre cerbumadis. Ne, ĉar mi tion faris, sed ĉar estis alie ol en normalaj tempoj, eĉ laŭ mia propra sento. Kaj timigas min tio, ke oni



dum milito pri tiaj aferoj havas alian opinion. Ke tiam ĉiuj ideoj pri honoro kaj homamo tiom aliĝas, ke mi estus ricevinta rekompenco kaj estus honorata kiel „heroeto”, se oni estus sciinta pri mia ago. Tiaj honoroj pro murdoj estis tiam ja memkompreneblaj! Tio igis min senespera. Ĉiam restis la sento al mi, ke nur venu nova milito, kaj tuj ni ree iĝos tiaj, kaj ĉiu kulturkonstruaĵo ruiniĝos, kaj ĉia bono en ni ŝrumpos kaj malaperos, kaj ni fariĝos kaŝmurdantoj sen konscio pri tio, nek antaŭe nek poste.”

Li silentis. Mi aŭskultis la ĝemadon de la vento kontraŭ la fenestroj, trafita kaj kaptita de sama senkonsoleco kia lin regis. Finfine mi diris: „Vi estis tiam infano. Nun vi ne farus.”

Li levis sian frue maljuniĝintan vizaĝon kaj alrigardis min. „Kiu scias,” li diris hezite, „kiu scias, kion ni ĉiuj faros, kiaj ni iĝos en la milito?”

Kaj la vento ĉe la fenestro kvazaŭ ĝeme ripetis: „Kiu scias? Kiu scias?”

(Willy Corsari)

Trad.: VANE.

### BONVENON.

(Ĉenkanto por 3 voĉoj).

1: D 5 | 5 3 2 | 1 3 4 | 5 3 2 | 1 . 1 |  
Bon - ve - non, ĉar - ma be - la Maj', la

G D A D 2 D D  
6 1 6 5 1 5 | 5 4 3 4 3 . 3 | 3 5 4 3 1 2 |  
bir - da ĥor' sa - lu - tas vin! Bon - ve - non, ĉar - ma

D D G D A D 3  
3 5 4 3 . 1 | 4 1 4 3 1 3 | 3 2 1 2 1 . 5 |  
be - la Maj', la bir - da ĥor' sa - lu - tas vin! Bon

A D A7 D G D A7 D  
5 . 7 1 . 5 | 5 . 7 1 . 1 | 1 6 1 1 3 5 | 5 5 1 . ||  
ve - non, ĉar - ma be - la Maj', la bir - da ĥor' sa - lu - tas vin!

Antverpeno. (Belg.) trad. JAN VAN SCHOOR.



## LA ELEKTRAJ LAMPOJ DE LA SINJORINO.

(teatraĵo unuakta).

Patro

Patrino

Personoj: Karlĉjo }  
 Linjo } du gefiloj, 10— k. 6 jaraj.  
 Maljuna Sinjorino.

*(La scenejo prezentas ĉambron; en la mezo staras tablo kun kelkaj seĝoj; en unu angulo staras bufedo, en alia divano. Sur muro pendas malgranda pafilo; sur la bufedo staras plado kaj teservico. Ĉe la tablo sidas patro, filo, filineto; ĉe la pordo staras la patrino. La knabineto desegnas, la knabo lernas sian lecionon).*

*La patrino (vestante sin per mantelo kaj ĉapelo):* La sinjorino de la unua etaĝo verŝajne vizitos vin ĉi tiun vesperon.

*Patro:* Kio?????

*Patrino:* Jes, mi renkontis ŝin sur la ŝtuparo, kaj ŝi estis tre ekscitita. Ŝi diris, ke ŝi estas je la fino de sia pacienco!

*Patro:* Kio do okazis?

*Patrino:* Ŝi diris, ke mardvespere, kiam mi estas for, ŝi preskaŭ freneziĝas pro la bruego, kiu regas ĉi tie. Ŝi ne scias, kion vi faras, sed estas terure, la tuta domo skuiĝas!

Ŝi ankaŭ diris, ke pro la tumulto en unu monato jam difektiĝis kvar elektraĵ lampoj en ŝia ĉambro, kaj ke ŝajnas, ke ni opinias, ke ili estas kapitalistoj, kaj ke ni priprensu, ke ili jam ne plu estas junaj, ktp., ktp.!

*Patro:* Kaj kion vi respondis al ŝi?

*Patrino:* Mi levis la ŝultrojn, ĉar mi vere ne sciis, kion diri. Vi ja mem scias, ke kiam mi estas hejme, mi ĉiam atentis, ke ni ne ĝenu la najbarojn! Mi konsilis al ŝi, viziti vin, por riproĉi. — Nu, mi foriru. *(Ŝi kisas la infanojn; diras iom petole al la edzo):* Kuraĝon! *(iras for).*

*Patro:* Nu, Karlĉjo, mi kontrolos vian lecionon. Aŭskultu: Kio estas la ĉefurbo de Anglujo?

*Karlĉjo:* Londono.

*Patro:* Bone. Kaj kion vi scias pri la trafiko en Londono? *(Oni sonorigas; Karlĉjo (malfermas la pordon).*

*Karlĉjo: (iom konsternite)* La sinjorino de la unua etaĝo, Patro!

*Patro: (afable):* Envenu do, sinjorino. Ho, tio plaĉas al mi, ke vi vizitas nin. Sidigu vin, sinjorino. Karlĉjo, enverŝu teon por la sinjorino, tion vi ja bone povas fari. Kaj kion vi diras pri mia filino? Ŝi vizitas nur du monatojn la lernejon, estas ankoraŭ ne sesjara, kaj jam povas skribi, presliterojn kompreneble. Linjo, kie estas via ardeztabelo? Alportu kaj montru ĝin al la sinjorino *(Linjo alportas la skribardezon, sur kiu staras grandaj literoj).*



*Linjo: (legas)* Mi manĝas bovon, la patrino manĝas bovon; mi estas dika, ankaŭ la patrino estas dika.....

*(la sinjorino intertempe eksidis)*


*Patro:* Nu sinjorino, ĉu vi povis tion, kiam vi estis tiom juna? Kaj rigardu la alian flankon! Tio estas preĝejo, kaj tri korvoj sur ĝi; kaj tiu virgo apude, kun la dika kapo estas mi.

*Sinjorino:* (iom konfuzo) Belega, belega.

*(Karlĉjo prezentas al ŝi kuketojn)*

*Patro:* Ĉu vi deziras kun mi paroli sola? Ĉu vi venas por aferoj? Eble vi preferas atendi ĝis la infanoj estos en la lito?

*(La sinjorino kapjesas).*



*S.ino:* Ho jes, mi havas sufiĉe da tempo.

*Patro:* Mi ĵus estis preta: mi kontrolis la lecionojn de mia filo.

*S.ino:* Nu, li certe bone scias, tia brava knabo?

*Patro:* Nu sinjorino, ne estis tre brile. Aŭdu Karlĉjo, estu ĝentila kaj alportu pli komfortan seĝon por la sinjorino.

*S.ino: (protestas)* Ho ne, sinjoro, li ne faru, ankaŭ hejme mi sidas ĉiam sur ordinara seĝo.

*Patro:* Nu, kosta neniom pli, kiam vi sidas pli komforte; do, kial vi ne farus! Iru infanoj, kaj alportu rapide la brakseĝon.

*(La geknaboj brue alportas ĝin el apuda ĉambro)*

*S.ino: (afable parolas al Linjo)* Dankon, multan dankon, kia forta knabino vi estas.

*Linjo: (fiere)* Forta? Forta? Vi vidu min, kiam mi boksas kun mia patro,

Bildo el: „Op Zonnige Wegen” door T. van den Blink.

Eldonisto: J. B. Wolters, Groningen—Batavia.



vi mirus; ĉiam mi venkas lin. (*La sinjorino ektimas; Linjo mienas terurige kaj staras batalpreta*).

*Patro: (ekstaras)* Mi estas preta por la lukto, komencu do.

(*Komence ili kondutas, kvazaŭ ili timas unu la alian, sed fine ili ekbatalas kaj subite metas la brakojn ĉirkaŭ la alian kaj ekluktas. La sinjorino rigardas timigite, dum Karlĉjo gaje ĉirkaŭsaltas.*)

*Karlĉjo: (krias)* Patro malvenkas, patro malvenkas! Luktu do, Linjo, persistu, kuraĝe! La lasta rondo. Li falas, li falas, prenu lin ĉe la piedoj; ne cedu, Linjo!

*Patro: (spiregante)* Kiom forta estas tiu knabino, kiu do pensus tion! Mi preskaŭ ne povas faligi ŝin. Estas terure, tion mi ne povas kontraŭstari. (*Li falas sur la plankon*). Mi cedas.

*Karlĉjo:* La giganto falis, li falis, Linjo venkis lin.

*Karlĉjo kaj Linjo: (ĝojkriante)* Hura, hura, la patro estas venkita. (Ili ekvidas sur lian bruston. La sinjorino eĉ aplaudas. La patro forpuŝas la infanojn kaj eksidas sur sian seĝon).

*Patro:* Estis nun sufiĉe.

*Linjo: (flate)* Ĉu vi nun bonvolu iom ludi?

*Patro:* Se vi do kantu. (*Karlĉjo alportas violonon aŭ buŝharmonikon, la patro ludas dolĉe:*

### „LULKANTO“

NUN DORMU, E\_TU\_LI.NO, NUR DORMU, MI - A FLOR' VIN  
LULAS LA PA\_TRI.NO KUN A.MO PLE\_MA KOR': HA,  
HOJ-DA, HOJ-DA, HOJ!

En songo aperados	Okulojn blujajn fermu,
Al vi la anĝelar',	Plej kara etulin'
Kantante ekdancados	Kaj dormu, ho, ĝis veku
Belega dancopar'.	La kara suno vin.
Ha, hojda, hojda, hoj!	Ha, hojda, hojda, hoj!

*La infanoj (dolĉe kantas)*

*Linjo:* Ho patro, ludu ankoraŭ alian melodion. Nun iom pli gajan. (*La patro ludas: „La KUKOLO“ No. 8(31) „La Juna Vivo“.*

*Ĉiuj kantas laŭte kaj ĝoje.)*

*Linjo:* Kaj nun la „Ĉaskorno“! (*No. 7. (30) „La Juna Vivo“*) — Atendu momenton, patro! Atendu iom, mi volas preni mian ĉapelon kaj montbastonon! (*ŝi foriras kaj baldaŭ revenas kun malgranda feltĉapelo kun grandaj fazantoplumoj sur ĝi kaj bastonon kun kurba tenilo.*

*Karlĉjo:* Mi volas havi mian pafilon (*prenas ĝin de la muro*)! Kaj la seĝoj



renverse (*faligas kelkajn seĝojn*)! Kaj la divano iomete flanken, por ke mi havu bonan kaŝejon (*flankentiras la divanon*).

(*La patro ekludas „La ĉaskorno” pli kaj pli rapide. Linjo kantas kaj marŝas ĉirkaŭ la tablo, fine ŝi grimpas sur ĝin. Karlĉjo eligas sovaĝajn kriojn, celas diversajn bestojn, tondrigas la pafilon. La patro piedfrapetadas laŭ la takto de la muziko*).

*Karlĉjo (laŭte kriante)*: Mi vidas ĉasaĵon! Mi havos ĝin! Kia bela cervo, tie supre sur la monto!! Tiun mi deziras havi!

*La sinjorino (ektime pro la bruo) al Linjo*: „Knabino, atentu do! Okazos akcidentoj: Vi tuj falos! Atentu la lampon!

*La patro (momenton ĉesante la ludadon, malestime)*: La lampo, mia filino ne kuras kontraŭ la lampon, sinjorino! Ŝi surgrimpas montojn, kaj kion vi opinias lampo, tio estas la suno, kiu banas la Alpopintojn per ora matenlumo! Ĉu vi ne povas vidi tion?!

*Sinjorino (time)*: Jes, jes, sed estu do singarda, ŝi tuj falos de la tablo, ho mi ege timas pro ŝi!

*Patro (dramece)*: Ne estas ĉi tie tablo! Mia filino nun paŝas sur monta glaciejo, sinjorino! Ŝi volas suprengrimpi la monton ĝis la plej alta pinto!! (*La patro ree ludas, laŭte kaj sovaĝe; pli kaj pli laŭte, la infanoj krias. Fine la patro falas sur seĝon, tutlaca*).

*Karlĉjo (respirante, falante sur la divanon)*: Ha, ha, tio estis rava! Kiom mi ĝuis! Mi ne plu povas! (*La sinjorino prenas Linjon de la tablo*).

*Patro: (al Linjo)*: Nu, vi nun enlitiĝu. Diru bonan nokton al la sinjorino.

*Linjo (obee ekstaras kaj ĝentile donas manon al la sinjorino)*: Bonan nokton, sinjorino. (*al la patro*): Bonan nokton, patro. Ĉu vi bonvolu enlitiĝi min?

*Patro*: Jes, mi kuniros. (*al la sinjorino*): Mi tuj revenos. (*al K.*): Se vi kuniras, mi donos al vi vian libron. Tiam vi povos ankoraŭ iom legi. (*la patro kun la infanoj for*).

*La sinjorino*: Mi venis ĉi tien por riproĉi ilin, sed mi ne faru! Ili estis tiom feliĉaj, ke mi ne volas malebligi iliajn aventurajn vojaĝojn. (*Karlĉjo revenas*).

*Sinjorino (al K.)*: Ĉu vi ŝatas legi?

*Karlĉjo*: Ho sinjorino, mi ege ŝatas, mi legis jam multajn librojn. Mi mem havas dek tri kaj mi ofte relegas ilin. Kaj mi nun pruntas el nia lerneja biblioteko, sed mi ricevas nur unu en semajno.

*Sinjorino*: Mi havas ankoraŭ belajn librojn de mia filo, kiu nun estas en Londono. Li ne povis kunpreni ilin. (*La patro revenas*). Ĉu vi ŝatas legi ilin? Mi volas prunti al vi.

*Karlĉjo*: Nu, tre volonte, sinjorino!

*Sinjorino*: Nu, mi volas nun hejmeniri. Venu kun mi, kaj mi serĉos libron por vi, se via patro permesas.

*Patro*: Bone, Karlĉjo, sed tuj revenu! Estas jam malfrue. Mi intertempe ordigos la ĉambron.

*Sinjorino (ekstarante, forgesante siajn riproĉojn)*: Nu, sinjoro, estis tre agrable al mi konatiĝi kun vi. Bonan nokton.

*Patro*: Bonan nokton, sinjorino (*ili donas la manon unu al la alia. La sin-*



jinoro kaj Karlêjo foriras. La patro ordigas la ĉambron, enbuŝe kantante gajan melodion. Post kelkaj minutoj Karlêjo revenas).

*Karlêjo (konsternite):* Patro, la sinjorino ne povis serĉi la libron, ŝi ne povis lumigi la lampon, ĉar denove la elektra lampo difektiĝis! Sed ŝi tute ne koleris!


*Patro:* Nu, estonte ni pli bone atentos, ĉu?

*Karlêjo:* Jes, kaj kiam mi revenis, mi sur la ŝtuparo renkontis la sinjorinon de la tria etaĝo, kaj tiu demandis, kial estis tia ega bruoj ĉe ni ĉi-vespere?

*Patro:* Kaj vi diris?

*Karlêjo:* Ke la sinjorino de la unua etaĝo vizitis nin!!

## BIRDOJ EN NIAJ ĜARDENOJ.



Ankaŭ turdoj volonte manĝas fruktojn. La nigra merlo kaj la makulita kantturdo estas miaj vintroĝastoj kaj printempe kaj somere ili min dankas per belaj kantoj.


La plej malgranda gasto estas la regolo. En Nederlando oni nomas ĝin vintro-reĝeto. Ĝi restas ĉiam je distanco kaj movas sin inter la branĉoj de malaltaj arbustoj. Kiam mi la unuan fojon pendigis nestkesteton kontraŭ la trunko de malalta pirarbo, mi vidis, ke tuj la birdeto alflugas al ĝi, esplorante la dometon de ĉiuj flankoj. Ĝi metis sin sur la tegmenton, pikis kontraŭ la muroj, fine eniris, eliris, denove eniris. La esplorado ŝajnis kontentiga, ĉar la tutan tagon ĝi alflugadis kun musko en la beko, metis ĝin en la kesteton kaj denove alflugis kun musko; mi nombris en du horoj kvardek tri fojojn. Estis klare, ke la regolo intencas konstrui tiesian neston. Sed ho ve, ankaŭ paruo rimarkis la konvenan kovejon. Ĝi en — kaj elflugis, forĵetis la tutan materialon de la regolo, kaj kiam ĉi tiu alflugis kun musko, la paruo forpelis ĝin, alproprigante al si la ejon.

Ĉu vi scias la fabelon pri la regolo? Iam la birdoj kunvenis por elekti reĝon kaj oni decidis, ke tiu birdo, kiu plej alte povas flugi estos reĝo. Ĉiuj birdoj samtempe flugis supren kaj baldaŭ evidentiĝis, ke la aglo estos la venkanto. Subite la regolo, kiu kaŝis sin inter la flugiloj de la aglo, aperis el sia kaŝejo kaj ankoraŭ pli alten flugis. Per plensona voĉo ĝi kriis: „Estas mi reĝo!” La birdoj tre indignis pro tia trompo, kaj por puni la trompinton ili kondamnis la regolon je ĉiama restado en malaltaj arbustoj.

(A. E. S. MICHELSEN).



## ENIGMO.



a, a, a, a, b, b, d, d, d, d, e, e, f, ĝ,  
i, i, i, k, l, m, m, n, n, n, o, o, o, o,  
o, o, o, o, o, p, r, r, r, r, r, r, t, t. — La  
vortoj signifas: en la mezaj vicoj, hori-  
zontale kaj vertikale: — beston; hori-  
zontale — literon, ciferon, beston, manĝaĵon,  
beston, krimulon, infanon, prepozicion, li-  
teron.


Latvolando, Riga.

B. Reichberg.

Inter la ĝustaj solvintoj ni dislotos 3 premiojn; ni akceptos ĝis la unua de Majo.

## LA SOLVOJ EL NO. 7

1		3		5		7
a		k		a		m
p		r		m		a
u	2	o	4	e	6	n
d	i	m	a	n	ĉ	o
	n		r		e	
	k		b		f	
	o		o		o	



La nomoj de la ĝustaj solvintoj: S.ro Bernardi, Genevo, Svislando; S.ro A. Brizzi, Pisa, Italujo; S.ino Haond, Chateaurons, Francujo. S.ro Hermann Grosser, Berlin-Neükölln, Germanujo.

La premiojn pro la verkaĵoj laŭ la bildoj en No. 7 gajnis: F.ino A. Barsingerhorn, Koedijk, Nederlando; S.ro Lafortest, La Roche par St. Vallier, Francujo.

## LUDO (malpermesita numero).

Oni elektu iun numeron, kiun oni ne rajtas diri, ekz. 6. Unu el la societo demandas al alia: „Kiom estas duoble 3?” Ĉar li ne rajtas diri 6, la demandito povas respondi: „Tio estas 5 kaj 1.” Nun li siavice demandas al alia persono, sed tiel, ke en la respondo estu la malpermesita numero. Ekz.: „Kiom estas 4-oble 9?” Oni povas respondi: „Tio estas 33 kaj 3 (35 kaj 1, 34 k. 2, ktp.)” Kiu diras la malpermesitan numeron, aŭ ne trovas ĝustan respondon en kelkaj sekundoj, donu garantiaĵon.



## DAŬRIGA KURSO.

## A. Paĝo el la memorlibro de la fabelverkisto W. Grimm.

Iun tagon proksimume 8-jara knabineto **sonorigis** ĉe mia domo, kaj petis paroli kun mi.

Mi afable akceptis ŝin, kaj informiĝis pri la celo de ŝia veno.

„Ĉu vi estas la profesoro, kiu verkis la belajn fabelojn?” **serioze** demandis la knabineto.

„Jes, infano mia.”

„Ĉu ankaŭ tiun pri la lerta tajloro, kiu edziĝas kun princino?”

„Certe.”

„En tiu fabelo staras, ke tiu, kiu ne kredas ĝin, pagu du markojn.” Kiel pruvon ŝi montris la fabelon en kunprenita libro.

„Ĉar mi ne kredas, ke tajloro edziĝas kun princino, mi ŝuldas al vi du markojn. Sed mi ne ricevas sufiĉe da poŝmono por tuj pagi la tutan sumon. Jen estas jam unu groŝo, la restaĵon mi pagos iom post iom.” El sia roza monujo ŝi prenis unu groŝon, kaj metis ĝin sur la tablon.

Nek mi, nek mia frato povis decidiĝi la infanon repreni la monon.....

Hannover (Germ.)

F. FISCHER.

B. Uzu en frazoj: **laca** — **laĉo**, lago — **lako**, vesto — **veŝto**, verko — **vergo**, aĵo — **aĝo**, frago — **frako**, kaĝo — **kaĉo**, kuraĝi — kuraci, loki — **logi**, grado — krado, **paĝo** — **paco**, **deserto** — **dezerto**, postaĵo — poŝtaĵo, vidi — **fidi**, fermo — **vermo**, kovro — kofro, **ĥolero** — kolero.

C. Traduku jenajn proverbojn, kaj lernu ilin **parkere**: Parolo estas **arĝento**, **oron similas** silento. — Persisto kaj pacienco kondukas al la potenco. — Kuraĝo ĉion atingas. — Kiu mem sin **gloras**, malbone **odoras**. — Ne karesu per mano, sed karesu per pano. — **Barelo** malplena sonas plej laŭte.

I. Lernu bone la novajn vortojn en A, B, C.

II. Traduku A, B, C, en vian gepatran lingvon.

III. Lernu parkere „Paĝo el la memorlibro... ktp.”

IV. Respondu al jenaj demandoj:

Ĉe kies domo sonorigis la knabineto? Kial ŝi sonorigis tie?

Pri kio ŝi parolis kun la profesoro? Kial ŝi ŝuldis al li du markojn? Kial ŝi ne tuj povis pagi tiun sumon? Ĉu la profesoro tuj akceptis la monon?



**Faru verkaĵon laŭ unu el jenaj temoj:**

Teruroj de estonta milito. — Bonaj kaj malbonaj flankoj de sporto. — Ekskurso ekster la urbo. — La vivo de Zamenhof. — Mia profesio. — Kial mi estas esperantist(in)o. — Vizito al esperanto-kongreso.

**Inter la sendintoj de la plej bonaj verkaĵoj ni dislotos 3 premiojn. Sendu ĝin antaŭ 1 Majo al „Red. „La Juna Vivo”, West-Graafdiijk.**

**RICEVITAJ ESPERANTAJOJ.**

A. Blok; Esperanto in 20 lessen. Zestiende herziene uitgave, bewerkt door M. de Waard. 1ste deel 40 ct., 2de deel 50 ct. Compleet ingenaaid f 0.90.

„Gvidfolio por Vojaĝantoj en Manĉoukŭo”. Ĉi tiun ilustritan Esp. gvidilon oni povas peti senpage ĉe: Sud-Manĉuria Fervoja Ko. (S.M.R.) Dairen, Sud-Manĉurio, Japanujo.

Kalendaro poŝtkarto, eld. de Int. Cseh-Instituto de Esperanto. Prezo: 10 ekz. f 0,25; 50 ekz. f 1,10; 100 ekz. f 2,—.

Ilustritaj kartoj, esp. surprisitaj. Aĉeteblaj ĉe J. L. Slavenburg, Apeldoorn, Nederlando. Prezo: 50 kartoj (5 specoj) kostas 25 cendojn, aŭ 3 respondkuponojn.

Rolf Nordenstreng: „La homaj rasoj de la mondo”. 212 paĝ., 140 bildoj. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. Prezo: f 1,30 broŝ., f 1,90 bind.

La libro estas varma pledo por amikeco inter la malsamaj rasoj — celo, kiun devas plene subteni ĉiu esperantisto. Tial la esperantistoj ankaŭ legos kun intereso la libron, kiu estas bonvena pliriĉigo de nia tro malriĉa popularscienca literaturo.

**KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.**


**Aperis artikoloj el „La Juna Vivo” en:** „Antaŭen” („Somera tago”, el „L. J. V.” No. 6), „Svenska Esperanto-Tidningen” (Nenio nova sub la suno, el „L. J. V.” No. 7—30).

Enkondukis „La Juna Vivo” en siajn kursojn: la esperanto-instruistino F.ino de Waart, Hilversum (Ned.), S.ro C. Jacobs, Heemstede (Ned.) kaj S.ro Herman Grosser, Berlin-Neŭkolln. (Germ.)

**Pro manko de spaco la korespondado devas resti ĝis la venonta numero.**

**Al niaj abonantoj: Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson.**





### LA KVINA LECIONO.

- |             |              |                |
|-------------|--------------|----------------|
| 1. kuko     | 9. korko     | 17. saketoj    |
| 2. sukeraĵo | 10. lakto    | 18. pak-papero |
| 3. kesto    | 11. kremo    | 19. hoko       |
| 4. ĉokolado | 12. butero   | 20. butikisto  |
| 5. skatolo  | 13. bombonoj | 21. kolumo     |
| 6. kakao    | 14. cigaroj  | 22. mano       |
| 7. fromaĝo  | 15. kovrilo  | 23. haroj      |
| 8. botelo   | 16. ŝinko    | 24. jako       |

#### A.

1. Sur la bildo estas granda butikiko. 2. En la butikiko estas multaj varoj. 3. Antaŭ la vendo-tablo staras knabo. 4. **Lia** nomo estas Karlo. 5. Karlo **aĉetas por** la patrino. 6. Malantaŭ la vendo-tablo estas la butikisto. 7. **Li** estas maljuna viro. 8. Liaj haroj estas **grizaj**. 9. **Ĉirkaŭ** lia **kolo** estas blanka kolumo. 10. Sur la muro malantaŭ la butikisto pendas: ŝinko, saketoj, paperoj kaj lardo. 11. La ŝinko estas sala; ankaŭ la lardo estas sala. 12. Sur la breto kuŝas tri kukoj. 13. La kukoj estas tre bongustaj. 14. En la **larĝa** botelo apud la kukoj estas **dolĉaj** sukeraĵoj. 15. Ankaŭ la ĉokolado estas dolĉa. 16. En la skatolo estas **amara** kakao. 17. Apud la kakao estas rondaj fromaĝoj. 18. La fromaĝo estas **grasa** kaj flava. 19. Ankaŭ **freŝa** butero estas sur la breto. 20. Buter**pano** kun fromaĝo estas tre bongusta. 21. En la du boteloj estas lakto kaj kremo. 22. La kremo estas bongusta en kafo.



## B.

1. Kie estas **la butikisto**? **Li** estas en la butikio.
2. Kia estas **la knabo**? **Li** estas malgranda.
3. Kie estas **la knabo kaj la butikisto**? **Ili** estas en la butikio .
4. Kie estas **la boteloj**? **Ili** estas sur la breto.
5. Kia estas **la fromaĝo**? **Ĝi** estas flava.
6. Kie estas **la kakao**? **Ĝi** estas sur la breto.
7. Kie estas **la bombonoj**? **Ili** estas en la skatolo.
8. Ĉu **la butikisto** estas en la butikio? Jes, **li** estas en la butikio.
  - a. Lerne bone la novajn vortojn.
  - b. Kopiu la frazojn en vian kajeron.
  - c. Traduku la lecionon en vian gepatran lingvon.
  - d. Respondu al jenaj demandoj per: *li, ĝi, ili*:

1. Kie pendas la ŝinko? 2. Ĉu la lardo estas en botelo? 3. En kio estas la sukeraĵoj? 4. Kie estas la butikisto? 5. Kie estas la fromaĝo? 6. Kia estas la lakto? 7. Ĉu la kakao estas dolĉa? 8. Kie estas la bombonoj? 9. Kia estas la kuko? 10. Kie estas la saketoj? 11. Kia estas la butikisto? 12. Kie estas la cigaroj? 13. Kio estas en la boteloj? 14. Kia estas la knabo? 15. Ĉu la sukeraĵoj estas amaraj?

## LA SESA LEClONO.

- |               |             |                  |
|---------------|-------------|------------------|
| 25. pesilo    | 34. maizo   | 43. ligno-ŝuoj   |
| 26. kilogramo | 35. barelo  | 44. litro        |
| 27. funelo    | 36. sapo    | 45. funelo       |
| 28. unco      | 37. sitelo  | 46. petrolo      |
| 29. fako      | 38. tenilo  | 47. petrol-kruĉo |
| 30. rizo      | 39. frukto  | 48. kolbaso      |
| 31. kulerego  | 40. knabo   | 49. lardo        |
| 32. pizoj     | 41. kravato | 50. vendo-tablo  |
| 33. nuksoj    | 42. surtuto |                  |

## A.

1. La jakto de la butikisto estas nigra. 2. La surtuto de la knabo estas dika kaj **varma**. 3. Ĉirkaŭ lia kolo estas **lana** kravato. 4. La ligno-ŝuoj de la knabo estas blankaj. 5. Malantaŭ la knabo staras petrol-barelo kaj apud ĝi estas petrol-kruĉo. 6. Sur la barelo estas funelo. 7. La butikisto estas tre **afabla** viro. 8. Li **parolas** kun la **Se eksterlandanoj grupe abonas la gazeton, ili pagas nur la nederlandan abonprezon.**



knabo. 9. Karlo **volonte** **babilas** kun la butikisto. 10. Karlo: „**Mi manĝis** hieraŭ **multe da** pizoj kun lardo. 11. La ventreto (malgranda ventro) estis **tro** dika. 12. **Poste** ĝi **doloris**. 13. La patrino **koloris**. 14. Si diris: Stulta knabo! 15. Ho, pizoj kaj lardo estas tre bonaj varoj!”

La butikisto: „Vi estas brava knabo.”

Karlo: „Ĉu cigaroj estas bongustaj?”

Butikisto: „Jes, **sed** ili ne **taŭgas** por infanoj: Por ili **nur** taŭgas ĉokolado kaj kuketoj.”

Karlo: „Kio estas en la **diversaj** fakoj?”

B.: „En la dua fako estas rizo, en la tria pizoj, en la kvara maizo kaj en la kvina nuksoj.”

K.: „Ho, tie pendas du kolbasoj. Dika kolbaso kaj maldika. Mi tre ŝatas. Kio estas en la du bareloj kaj la sitelo?”

B.: „En unu barelo estas petrolo kaj en la alia estas sapo. Jen; sur la sitelo estas ĉerizoj kaj en la sitelo estas marmelado.”

K.: „Vi estas riĉa. Multaj kuketoj kaj sukeraĵoj estas en la butikiko!”

B.: „Mi estas malriĉa. La butikiko apartenas al **sinjoro** Jansen. Vi estas malgranda **babululo**. Jen, kuketo por vi. Kaj **nun** al **via** patrino!

**B.** Tre granda kulero estas kulerego. Tre granda pordo estas pordego. Tre bela estas belega. Kio estas: seĝego, bastonego, arbego, bonega, grandega?

a. Lernu bone la novajn vortojn en A kaj B.

b. Kopiu la frazojn en vian kajeron.

c. Traduku la lecionon en vian gepatran lingvon.

d. Respondu al jenaj demandoj:

1. Kie estas la kolbasoj? 2. Kie estas la cigaroj? 3. En kio estas la bombonoj? 4. Kia estas la jako de la butikisto. 5. Kie estas la petrolbarelo? 6. Ĉu la petrolbarelo estas granda? 7. Kie estas la kulerego? 8. Kiaj estas la bombonoj? 9. Kio estas en la malgranda barelo? 10. Kiaj estas la ligno-ŝuoj de la knabo? 11. Ĉu la knabo estas granda? 12. Ĉu la cigaroj estas sur la breto? 13. Kio estas sur la granda barelo? 14. Kio estas en la fakoj? 15. Ĉu la butikisto estas granda?

KOREKTO: Sur paĝo 125 („L.J.V.” No. 8), demando 12, staras: **kia** estas la folioj de la planto. Legu **kiaj**.....

#### ATENTU!

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „La Unuan Jarkolekton” de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.



## KORESPONDADRESOJ.

**Aŭstrio:** 16 jara knabo dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Adreso: S.ro Georg Rinnerthaler, Stacidomo Strasswalchen ĉe Salzburg.

**Aŭstrio:** 15 jara fraŭlino, kiu tre ŝatas fotografaĵojn, volas kor.: F.ino P. Mühlbauer, Strasswalchen, ĉe Salzburg.

**Ĉeĥoslovakujo:** Al ĉiu, kiu sendos al mi 10 vidajkartojn aŭ fotografaĵojn el sia lando, mi tuj sendos 10 belege koloritajn kartojn el Ĉeĥoslovakio. Adr.: Fakinstruisto F. Omelka, Hluk.

**Ĉeĥoslovakujo:** Filatelistoj, atentu! Ĉeĥoslovakaj kam. volas kun vi interŝanĝi poŝtmarkojn. L. J: Svoboda, Plzen, „U.Zvonu”. Certa resp.

**Danujo:** Al ĉiu, kiu sendas al mi nacilingvaj gazetojn de sia lando, mi sendos gaz. en dana lingvo. Adr.: S.ro H. E. Petersen, Barthsgade 6, Aarhus.

**Danujo:** 23-jara laboristo dez. interŝanĝi poŝtkartojn il. kaj poŝtmark. Certa resp. P. Christensen, „Kildeveld”, Taŭlov.

**Danujo:** S.ro Sv. Hansen, 19-jara, dez. kor. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Adr.: Haslev Højskole, Haslev St., Sjælland.

**Danujo:** 5 samideanoj deziras kor. Adresoj: F.ino M. Nielsen, Mølleplads 13.a, „Pensionatet, Aalborg; S.ro M. Mortensen, Kastetvej. II, „Kalderen”. Aalborg; S.ro N. A. Thomsen, Hjelmerstald 21, Aalborg; S.ro v. Christensen, Christiansgade 9 (o.g.), Aalborg; S.ro Carl Listh, M. Hemmingsvej 12—1, Aalborg.

**Francujo:** S.ro A. Lechelle, 128, Ave. de Condé, Valenciennes (Nord) dez. interŝ. poŝtmarkojn kaj il. poŝtk. Kiu sendas 30 aŭ 50 p. m. de sia lando ricevos de mi la saman kvanton. (francaj aŭ belgaj).

**Francujo:** S.ro E. Gickel, instruisto, Keryado, dez. interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn. Certa respondo.

**Germanujo:** Juna Samideano deziras interŝ. bildpoŝtk. kaj poŝtmarkojn. Certa resp. Adr.: S. Steinbrecher, Theaterstr. 4, Döbeln.

**Germanujo:** Gesamideanoj pruvu, ke esperanto estas utila por poŝtm. kolektantoj. Resp. Certa: Fr. Ostrowsky, Essen-Kupferdreh, Oststr. 109.

**Nederlando:** 30 jara katolika fraŭlino dez. kor. kun samaĝaj gefraŭloj. Adr: J. M. Rombout, v. Gilsestraat 35, Roosendaal.

**Nederlando:** F.ino P. Aŭkema, instruistino, dez. kor. kun eksterlandaj instruistoj pri ĉiuj temoj. Adr: „Mia Dometo”, St. Nicolaasga.

**Nederlando:** Kurso de komencantoj (15—25 jaraj) dez. kor. kun samideanoj el ĉiuj landoj. Adr: F.ino E. G. Bossen, Oudkarspel (NH).

**Nederlando:** Instruisto en ned. popollernejo dez. kor. per interesaj bildkartoj kaj leteroj. J. M. Toorneman, Diepenv. Weg 169, Deventer.

**Sovetio:** S.ro V. Gruŝĉinsky (studento), Plechanovstr. 36, Nikolaev, dez. kor. kun ĉiuj landoj por poŝtk. kaj leteroj.

**Svedujo:** Edzino kaj patrino dez. kun samsortaninoj kor. kaj interŝanĝi pensojn per let. kaj poŝtk. Adr: G. Sandberg, Esperanto-Hejmo, Smålands-gat. 33, Jönköping.

**Portugalujo:** Nova abonanto dez. kor., interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtk. il., esp. ŝlosilojn. J. Araŭjo, Rua do Arco do Carvalho, 191 p. o., Lisbono (N).

**Portugalujo:** S.ro L. R. Brito, dez. kor. pri muziko kaj popolokultimoj. Adr: Rua Guilherme Anjos, M-Lisbono (N).



**Portugalujo:** S.ro José Araŭjo, 32 jara, dez. kor. kun sudeŭropaj, orientaj kaj Afrikaj gesamideanoj. Interŝ. poŝtk. il, poŝtm. kaj fotojn. Certe resp. Rua do Arco do Carvalho, 191 p. o. Lisbono.

**Aŭstrio:** Aŭstra komercisto dez. kor. kaj interŝ. poŝtmarkojn. S.ro Sepp Jesinger, Strasswalchen bei Salzburg.

**Nederlando:** 22 jara fino dez. kor. per let. kaj poŝtk. il. Certa respondo. Geer Haas, Dorpsstr. 58, Oostwoud (N.H.).

**Aŭstrio:** J. Wiesböck, Schatendorf, Bgld., dez. koresp. Anglalingve kun Anglanoj. Respond. Esperante, Germane aŭ Angle.

### OOMOTO INTERNACIA

estas esperanta, monata, ilustrita, riĉenhava — homaranisma, prijapana, kultura kaj vere internacia revuo.

Jen kelkaj rubrikoj: Japana vivo, orienta kulturo, filozofio, literaturo, novspirito, japanlingva kurso, esp.-movado ...

#### Petu Senpagan Specimenon!

Oomoto Internacia, Kameoka, Kioto, Japanujo.



### „FLORETOJ”

Porinfanaj Rakontoj  
tradukitaj de la

„VENDREDA KLUBO”  
en Winschoten  
(Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj  
bildoj  
de C. Jetses  
prezo ..... 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la  
eldonisto:

**J. B. WOLTERS**

Groningen — Den Haag  
Batavia.

### Kvar paŝojn antaŭen

faras la regule aperanta, dumonata,  
popolsciencia revuo

### SCIENCA GAZETO

Jen la novaĵoj por la jaro 1936-a (la  
5-a de Scienca Gazeto):

1. Ĉiu numero havos 24 paĝojn ne kalkulante la kovrilon).
2. La unua parto de ĉiu numero (longaj artikoloj) estos presata per pli grandaj literoj.
3. La gazeto estos ilustrata.
4. De nun ni sendas specimenon senpage. Nur petu ĝin, sed sendu la afrankon.

Nur al frupagantoj ni garantias liveron  
de la 1-a n-ro 1936-a.

Jarabono: 1,30 guldeno.  
Eldonata de Amerika Esperanto-  
Instituto.

Abonebla ĉe  
„LA JUNA VIVO”

### „IDEALA ESPERANTO BIBLIOTEKO”

eldonas:

BLUA SANGO ..... Willy Wood.  
LA MOREA PERLO ..... D. Simson.  
IRISIS ..... H. 't Sas.  
SUB LA VITRA  
KUPOLO ..... L. v. Weddingen.

Ĉiuj interesaj romanoj, 200 p.  
Prezo nur po f 0,50.

(plus f 0,20 por sendkosto).

Aĉetante la 3 unuajn ekz. oni pagas  
nur f 1,35 (f0,60).

Mendu viajn librojn ĉe la redakcio  
de „La Juna Vivo”!